

Numero: 291.
Julio: Aŭgusto 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

La homaro ne meritigas Esperanton

Eble mi estas tro pesimisto kaj mi vidas la mondon pere de nigraj okulvitroj. Fakte antaŭ jardekoj mi kredis kaj esperis, Esperanto helpas solvi multe da problemoj de la homaro.

Bedaŭrinde la forflugantaj jaroj ne pruvis, ke iam alvenos ĉi tiu epoko.

Ni homoj iras sur malĝusta vojo, kiu kondukas nenien. Ĉies fino estas milito kaj perforto.

Esperanto estis kreita en la deknaŭa jarcento. Dume pasis pli ol cent jaroj, sed la homaro apenaŭ ŝanĝiĝis.

Ni plu fabrikas terurajn armilojn, mortigilojn. Jam ekzistas bomboj, kiuj povas pereigi la tutan terglobon dum kelkaj minutoj.

Kial ni estas murdistoj? Kial ni murdas brutale niajn homfratojn? Ni povus vivi pace sur Tero. Ni devus atenti nur pri la alia kaj ne kaŭzi dolorojn.

La migrantoj inundis Eŭropon. Ĉi tio dividas la homaron. Estas, kiuj apogas la migrantojn, sed estas, kiuj kontraŭas ilin.

Kiu pravas?

Estus bone scii.

Fakte, ne estas bone, se milionoj devas forlasi patrujon. Senfinaj homamasoj, lacaj homoj. Kiom da energio eluziĝas dum tio. . Monatoj, jaroj elfalas el la vivo de la migrantoj.

Neniu scias, kion alportos la estonto.

En la deknaŭa jarcento doktoro Zamenhof kredis, la Lingvo Internacia donos al la homaro pacon kaj sinceran fratecon.

Ĉu nia majstro eraris? Mi ne kuraĝas diri tion. Li deziris bonon al la homaro.

Laŭ mi Esperanto naskiĝis tro frue. Ankoraŭ ni homoj ne maturiĝis, por ke ni ricevu tian grandiozan lingvon.

Eble iam alvenos ĉi tiu tago, sed mi petegas ne priridu min! Ĝi povos okazi post multaj jarcentoj, se ankoraŭ ekzistos Tero.

Malgraŭ tio, ni ne rezignu! „Ni semu kaj semu, eble tamen el la eta semo elkreskas io!”

-Redaktanto-



Steloj falas

Ĉu steloj estas eternaj sur la firmamento? Se vi suprenrigardas nokte, vi vidas milojn da bele brilantaj steloj.

Min ĉiam ravas ilia vidaĵo kaj provas diveni, sur kiu stelo vivas homsimilaj estaĵoj.

Ankoraŭ ni ne renkontis ilin. Kvankam laŭ multaj sciencistoj, astronomoj en la universo estas milionoj da steloj, kie vivo povas ekzisti.

Ĉu por ni estos bone, se antaŭ ni malfermiĝos la universo kaj ni povos konatiĝi kun eksterteruloj?

Ni ne forgesu, ankaŭ sur nia planedo estas multe da problemoj, kiuj atendas la solvon. Ni ne trovas la pacan kunvivadon unu kun la alia. Tamen ni revas pri steloj.

Mi sentas kaj scias, se en la kosmo estas raciaj estaĵoj, kiuj ne deziras amikecon kun tiaj estaĵoj, kiuj militas kaj ne povas vivi pace.

Eble ili atentis nin – ĉi tion pruvas la multaj, neklarigeblaj flugadoj de nifoj – la eksterteruloj ne volas kontakton kun ni. Unue ni devus ŝanĝiĝi kaj plenkreskiĝi al la kosma vivo..

Ni estas fieraj pri niaj rezultoj en la scienco kaj antaŭ niaj okuloj ŝvebas la konkero de malproksimaj planedoj, eĉ sunsistemoj.

Ĉu ni homoj eksportos ankaŭ tien la militojn kaj perforton?

Ne tion ni ne faru! Unue ni ellernu vivi pace kaj harmonie unu kun la alia. Per armiloj ne eblas konkeri la universon. En foraj steloj ĉie regas vera paco.

Ĉu nun vi demandas, kiel mi scias ĉi tion? – Mi ne scias, nur io mesaĝas al mi de iu fora stelo. Ĉiu homo devus ekaŭdi ĉi tiun mesaĝon.

Mi petas vin, malfermu viajn orelojn kaj lasu, ĉi sekreta sento enpenetru vian koron. En la koro estas eta loko, kie kolektiĝas ĉi tiuj mesaĝoj.

Ne forgesu, via koro estas universo, kiun kunligas kun la malproksimaj mondoj nevidebla ŝnuro.

Klopodu konservi ĉi tiun ŝnuron, por ke ĝi ne disŝiriĝu! Ĉiam sentu la forton, kiu direktas nin! Ni homoj repaciĝu kaj ni fariĝu la infanoj de la senfina universo.

-Ŝaŝa-



POEZIO

Mi tre ŝatas la poemojn de Julio Baghy. Mi rekomendas lin al ĉiu. Se vi estas ankoraŭ komencanto kaj ne legis Esperanto-poemojn, versojn, nepre komencu la konatiĝon kun la poemoj de la onklo Julio.

Li estis grandioza poeto, kies verkaĵoj estas veraj perloj de Esperanto - literaturo. Ĉiu esperantisto devas koni liajn versojn. Ili estas facile kompreneblaj por ĉiu. Ankaŭ per malmulte da lingvoscio oni povas ĝui ĉi tiujn poemojn.

Multaj el ili estas kanteblaj. Se vi legas la poemojn de Julio Baghy, mi garantias vi havos eksterordinaran travivaĵon.

Do ne hezitu, interrete serĉu kelkajn versojn de Baghy kaj legu ilin.

Estas mi esperantisto

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
"Bonan tagon! Ĝis revido!"
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikis,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed neniom mi ofertas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros "rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XXVI-a

Johano jam komprenis nenion. Lia kapo tre dolorigis lin.

La onklino nur staris kaj ridetis. Cinike ŝi ripetadis:

–Ŝi malaperis. La knabino estas en infero.

Ĉi tio ege ĝenis lin kaj post iom da tempo li diris kolereme al la onklino.

–Kara onklino, kial vi estas cinika? Ŝi plaĉas al mi. Helpu al mi serĉi Elinjon!

–Elinjo malaperis. Ŝi neniam revenos. Ŝi estas nur en via memoro. Ni iru kaj ni serĉu la elirejon el ĉi tiu damnita loko.

–Kara, kien ni iru? Ĉu vi forgesis, ni estas ekzilitaj al la planedo Pluto. Surface sovaĝuloj atendas nin. Oni ĉasas nin, kiel leonon en la savano. Nia vivo baldaŭ finiĝos.



La onklino restis trankvila. Li ne komprenis, kio donas al ŝi forton elteni ĉi tiun danĝeran situacion. Por li estis granda sekreto. Antaŭ kelkaj minutoj ŝi estis ankoraŭ en paniko kaj kiel infano ploregis kaj kriegadis.

Nun ĉio ŝanĝiĝis. La oklino Izabela trankvile ridetas, kvazaŭ ŝi estintus en sia loĝejo. Certe ŝi frenezigiĝis kaj ŝia cerbo iris promeni.

Terure! Dum ĉi tiuj kelkaj tagoj, kiom da travivaĵoj li travivis. Li ankoraŭ vivas. Sed li ne sciis ĝis kiam.

Johano ne vidis la sencon de sia vivo. Li perdis la paciencon kaj ĉio ŝajnis senespera.

Li decidis supreniri kaj lasi, ke li estu ĉasita. Kial vivi? Kial esperi? Kiam la estonto jam ne ekzistas.

Neatendite akra lumo estiĝis en la ĉambro. Lia patrino envenis kaj ŝi diris:

–Filo mia, vekigu! Estas la sesa horo. Post duonhoro ekveturos la buso. Ne forgesu, hodiaŭ estos via unua labortago!

Johano ĉirkaŭrigardis. Unue li ne sciis, kie li estas. Ĉu li nur sonĝis la tutan aventuron sur Luno? Ĉio estis tre reala. Io okazis dum li dormis. Li vojaĝis en la tempo. Li vidis la futuron.

La ĉambro estis malriĉe meblita. Krom modesta lito tie estis ŝranko, tablo kun du seĝoj. La muroj ankoraŭ estis nudaj. Sur la planko kuŝis malnova,

eksmoda tapiŝo. Antaŭ nelonge ili translokiĝis ĉi tien kun sia patrino. Lia patro antaŭ duonjaro forlasis ilin.

Li havis bonŝancon, ĉar rapide li ricevis laboron en la urbeto. Lia patrino laboris en la proksima vendejo, kiel kasistino.



Ŝi denove envenis la ĉambron por kontroli Johano.

–Rapidu, ĉar malfruos!

Johano vestis sin kaj poste iris en la banĉambron. Per malvarma akvo lavis sian vangon singardeme. Li atentis, ke la vesto ne estu akva.

Dum li lavis sian vangon, senĉese pensis pri la sonĝo. Ĝi estis tre stranga sonĝo. Kion ĝi signifas?

Onidire la sonĝoj havas signifon. Li vidis la futuron, kiu ne estis tro rozkolora. Li ektimis de ĝi.

Li timis paroli pri ĝi. Certe ĉiu ridus pri li, se li rakontus la sonĝon.

Ĉu ankoraŭ li sonĝos similajn? Estus bone scii.

Sen matenmanĝo li paŝis el la domo. Li devis tre rapidi, ĉar en la strato li ekaŭdis la bruon de la aŭtobuso.

–Fino–



(Rimarko: Baldaŭe Aventuroj sur Luno ekaperos ankaŭ en PDF)

Por infanoj

Fabelero



Du malgrandaj formikoj ekiris trovi sian feliĉon en la mondo. Ili iris, iradis de herbo al herbo. Ili grimpis ĉiun ŝtonon, ŝtoneron. Ĝis tagmezo ili iris senhalte, senripoze, sed ili trovis nenion.

–Ni devus manĝi ion. Malsate oni ne povas iri.

–Laŭ mi eblas, nur pli malrapide – rimarkis la pli saĝa formiko. Ili iris plu. Subite ili renkontis grandan paneron. Ili ripozis iomete kaj ili decidis porti ĝin hejmen. Sed ĝi estis giganta por ili.

–Kial porti ĝin hejmen? – rimarkis la pli ruza formiko. – Mi proponas manĝu ĝin ĉi tie!

–Bonega ideo, sed tamen mi diras, ni manĝu el ĝi iomete por ke ni reakiru nian forton – konsentis la alia. – Neniu rimarkos, ke ni manĝis el ĝi.

–Ni manĝos la tutan.

–Tion ni ne povas fari. Ĉi tiu ago estus kontraŭ la formikohonoro.

–Min ne interesas la formikohonoro. Mi estas malsata kaj mi volas manĝi ĝin.

Rano ekaŭdis ilian diskutadon kaj ĝi iris al la du formikoj.

–Stultaj formikoj, ili ne povas interkonsenti, tial mi devas dividi ĝin – kvakis la rano.

La rano prenis la paneron kaj senhezite ĝi manĝis la tutan.

Ekde ĉi tiu tago la formikoj ĉiam portas hejmen la trovitan manĝaĵon.



Malgranda betulo



En parko staris malgranda betulo. Ĝi havis junajn, verdajn foliojn. Sed la betulo ne ŝatis la verdajn foliojn. Ĝi deziris havi ion ekterordinaran. En iu tago tiel ĝi susuris al la vento:

–Mia songo posedi orofoliaron.

Kiel la deziro estis eldirita, la verdaj folioj de la betulo komencis ŝanĝiĝi.

Kiam matene la suno ekaperis, la folioj brilis, kiel oro. Preteriranto mire tuŝis ĝiajn orofoliojn. Poste li deŝiris kelkajn kaj metis ilin en sian poŝon.

–Terure! – ĝi diris kolereme, sed ĝi povis fari nenion.

Baldaŭe homoj alvenis el ĉiu direkto. Ĉiu deziris almenaŭ unu orofolion de sur la arbo.

–Kial mi deziris orofoliojn? – ploretis la betulo kaj ĝi estis tre malfeliĉa.

Bonŝance la vento ekaŭdis ĝian lamentadon kaj ĝi komencis skuadi milde la betulon. Pasis kelkaj tagoj kaj en iu mateno kiam la unuaj sunradioj kisis la floran kampon, sur la nudaj branĉoj denove ekaperis verdaj, junaj folioj.

(El hungara lingvo tradukis: Apáti Kovács Béla)



Photo -

Humuro

Helpo

Viro iras en la dezerto. Li renkontas arabon.
 –Bonan tagon, sinjoro. Ĉu vi povus helpi al mi?
 Kie estas la plej proksima oazo?
 –Jes, kompreneble. Iru rekte antaŭen kaj merkrede
 turnu vin dekstren!

><



><

–Sinjoro, ĉu vi kredas je flugteleroj?
 –Jes, kompreneble.
 –Ĉu vi jam vidis flugtelerojn?
 –Ekde mia eksgeedziĝo ne.

><



><

–Kara sinjoro vi resaniĝis – diras la kuracisto. –
 Dank' al via forta organo!
 –Ĝustatempe vi informis min, mi jam volis pagi al
 vi.

><

Humuro

Rompoŝtelisto

Rompoŝtelisto sonorigas ĉe loĝejo.
 Ene knabino demandas:
 –Kiu vi estas?
 –Salut', knabineto! Ĉu nur vi estas hejme?
 –Ne. kun mi estas ankaŭ Mario.
 –Kiom jara li estas?
 –Tri.
 Li perpiede enrompas la pordon. En tiu momento
 antaŭ li ekaperas Mario, la trijara batalhundo.

><



Marborde

En marborda hotelo la gasto demandas la
 pordiston:
 –Ĉu eblas baniĝi en la golfo?
 –Jes, komprenble.
 –Ĉu certe ne estas ŝarko?
 –Tion mi garantias, sinjoro. Kie estas krokodiloj,
 tie ne estas Ŝarkoj.

><

